



PENSEO

N-ro 303

jan. / 2017

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 28-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

Anteo (Ĉinujo)



kiu estas plej potenca?

dio punas kulpojn per masakro;
budho kastras piojn revivige.
senescepte ili jam ĝisoste mortis
sed gehomoj ilin savas spirinstige.

2013.09.29

Ŝafoj kaj buĉistoj

malamo aluvias kaj ŝtoniĝas.
kiel abrogi landlimojn la marajn?
buĉistojn jam absolvis buĉamantoj;
oferas ŝafoj ŝafaĵojn bonfarajn.

2013.09.28

ludo de gesteluloj

hieraaŭ mediato ilin jam separis.
hodiaŭ ili loĝas kune en vilao.
tage edzecon sian per rid-heno li abjuris.
nokte abortis filon leĝan ŝi kun plor-iao.



2013.09.25

superanimaloj

lumo kaj ombro aberacias
tra la okuloj kaj la arĉlango –

kemiarmiloj kun atombomboj
panon elbakas dolĉan sen manko.

2013.09.24

Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



Jardino

La montaron
automobiloj formanghas
survoje al marbordo,
kie vivo kushas
parenteze.

Malgrau la brizo,
kiu malfaras la lumon
de chi tiu mateno
kudrita en bluo,
ankorau miras
Decembro
pro eroj da memoro.

Kaj ripetighas
la historio
sen koncedoj.

Cabo Frio, 27/12/2016

Mori (Usono)



AFORISMe(18)

Politikistoj
ne ŝatas pensemulojn,
ili ja preferas ŝafojn
kaj mulojn!

Liberbatalantoj
 kiuj ne havas
 saĝon
 post liberiĝo el kaĝo
 eniras en alian kaĝon!

Homon
 naskas naturo
 sed kreas kulturo!

Estu preta
 kun ĝojo,
 ektrovos vin
 la vojo!

Homo
 en la homaro
 similas al fis'
 en maro!

Memfida,
 trankvila persono
 potencas kiel leono!

Estu valora
 pli ol oro
 sed modesta
 samkiel tero!

En la mondo de
 politiko,
 ankoraŭ regas pensoj
 de mezepoko!

Homo
 post la morto
 postlasas monon
 kaj oron
 sed kunportas honoron
 kaj gloron!

Ne serĉu
 malbonan aŭ bonan
 personon,

volu vidi en ĉiu homo
 bonon!

Neniu damaĝo
 pli grandas ol
 manko de saĝo!

PAPOS NASCENTES (Brazilo)



Pardono

Omaĝe al Ferreira Gullar

Suferas Poezio
 pro la morto de elstara poeto
 ĝin ne suferiganta

Enlumigas Poezio
 kiam silentas la voĉo
 de tiuj neniam silentigitaj
 antaŭ maljusticoj de popoloj
 putraj de l' aroganteco

Solidarigas Poezio
 al senhereditaj
 al malriĉigitaj
 de la maldeco de popoloj
 perfidantaj la propran animon
 malsentma pro voluptemo

Elaĉetas Poezio
 aplaŭdita piede de la sankta silento
 de l' senrimedaj suferantoj
 de la doloroj
 de la obstinegaj aŭ eventualaj
 subpremantoj

Poezio - pardono dum nepardonema
 denunco.



Cezar (Germanujo)



Biletkontrolo

Vizaĝoj en la tram' dum hor'
rigardas pro lac' kun rifuz'.
Silento frida kun fervor'.
Evitas min ĉiuj kun ruz'.

Mi estas sen veturbilet'.
Kontrolas antaŭe jam dam'.
„Evidu gapi do al ŝi“,
tamburas kompate la tram'.

„Bileton petas mi, sinjor'“,
postulas de mi la fraŭlin'.
„Ho, kara, kial la fervor'?
Paŭzetu pri via rutin' “!

La ino tiras min ĉe l' brak'
„Vi estas, karulo, ne Di'.
Ĉu tio estas via jak'?
Ekstaru kaj venu kun mi! “

Mi trotas kiel hund' post ŝi.
Elpaŝas la in' kun plezur',
ridetojn ĵetas eĉ al mi,
sed kien ŝi gvidas min nur?

Manuéle Rovere (Italujo)



ĈU ENAMIĜI?

(kantteksto)

Ĉu enamiĝi? Estas nenio por fari
por ne resanigebla romantikul',
kiu pri sentoj ne kapablas avari
kaj ĉiam restos idealisma bonul'.
Do, enamiĝi... La fato tiel decidas,
se li renkontas inon, kia vi,
en kiu li, kun naiveco, ekvidas
la ĉarmon de anĝelo de l'edeno.

Amoiluziigoj revekiĝos ĉiuj,
promesoj viaj al li ŝajnos pura roso.
Ĝis kiam pulsos kor', ĝis la plej lasta
spir'
li estos la kaptito de via dezir':
vi l'ideal', plej bela rev' realiĝinta.
Enamiĝinta... Perfingre tuŝi l'ĉielon,
provi la plej mirindan, varman senton.
Li vidas lumon funde de tunelo,
cerbo kaj koro perdas la prudenton.
Projektoj por l'estont': vi estos lia
mond',
en manojn viajn metos li siajn esperojn.
Sed se, hazarde, via koro perfidos lin,
ŝajnos al li, ke venos tuj la mondo fin',
li ne plu havos emon, ne kapablos plu
reenamiĝi... Alian fojon, neniam!,
ĉar vi forŝtelis la animon lian.
Li sentos sin estaĵo senvalora,
sen plu eĉ unu revo, malespera.
Sed tempo vundojn liajn resanigos,
l'espero vivovolon retrovigos,
ĉar elĉerpiĝos Amo, ja neniam!
Vivu la vivo, tamen bela ĉiam!



Jongsop Parko (koreio)



Haltu!
Kaj aŭskultu min momente
Plantoj, animaloj, kaj la homoj,
Montoj kaj riveroj, la ĉielo kaj la tero.

Vin purigu kaj plenigu!
Korpojn kaj spiritojn per purblanka infaneco.

Unuiĝu!

Herboj, arboj, ŝtonoj, rokoj kaj cetero
Jen la nordo kun la sudo, jen landaro kun
landaro
Ĝustatempe unuiĝu kaj brakumu reciproke.

Estu paca!

Trans la monto kaj la valo al rivero kaj la
maro
Sur vilaĝoj kaj grandurboj, tra la landoj kaj la
kontinentoj
Paco flugu vaste kiel akvo kaj ventego
Blanke kaj purege
Dancu kune en la paco por eterne!



(2015.12.25)

Venícius de Moraes

ADIAŬA SERENADO

Oj, la lun' en la ĉielvaku'
Ne estas tiu de ni du
Perditaj en pasi'
Kaj la nokton super nia am'
Salutas nia ĉi-senam'
L' adiaŭ-agoni'...

Oj, ĉi volo resti sed la devo nepre iri
Oj, ĉu ami estu ne la morton plendeziri
Kaj en la larm' reflekti l' nedaŭran momenton
De stel' kies pura lumo iĝis mort'?
Oj, vi ino, stelo en rebril'
Iru, ja restu, sen oscil'
Al mi la kor' en ŝir'
Mian bruston viaj ungoj jam
Ĝissange iĝu, ne plu am'
Rajtu, nek iluzi'

Oj, ĉi volo resti sed la devo nepre iri
Oj, ĉu ami estu ne la morton plendeziri
Kaj en la larm' reflekti l' nedaŭran momenton
De stel' kies pura lumo iĝis mort'?

En nokto obskura kiel mia sort'...

Esperantigis



Ŭel Roŝa (Brazilo)

Zhuangzi (369-286 a.K)



Zhuangzi

ĈAPITRO OKA

Palmopiedaj fingroj

§08-03

Homoj kun milda konfuzo povas ŝanĝi sian orientiĝon de la vivo; homoj kun serioza konfuzo povas ŝanĝi sian denaskan naturon. Kiel do ni scias tion? De kiam la reĝo Shun komencis malordigi la mondon per la humaneco kaj la justeco, ĉiuj homoj senĉese klopodas por strebi al ili. Ĉu tio ne estas la pruvo, ke la humaneco kaj la justeco ŝanĝas la homan naturon?

Nun lasu al mi ekspliki tion. Ekde la tri dinastioj Xia, Shang kaj Zhou ĉiuj homoj en la mondo estas influataj de eksteraj estaĵoj kaj sekve senĉese ŝanĝas sian denaskan naturon. La homoj vulgare sin ofertas por la profito; la noblaj sin ofertas por la famo; la regnificistoj sin ofertas por la gloro de sia familio; la saĝuloj sin ofertas por sia regno. Malgraŭ siaj

malsamaj okupoj kaj reputacioj akiritaj, tiuj ĉi homoj havas komunecon: damaĝi sian denaskan naturon kaj fari sinoferon pro vanteco.

Zang kaj Gu, du ŝafistoj, perdis ĉiu siajn ŝafojn. Kiam la unua estis demandata, kiel tio okazis, li respondis, ke tiam li legis libron; kiam la dua estis demandata, kiel tio okazis, li respondis, ke tiam li ludis ĵetkubojn. La du faris malsamajn aferojn, sed la perdo de la ŝafoj estas la sama.

Boyi mortis por sia reputacio sur la monto Shouyang; la rabisto Zhi mortis por riĉaĵo sur la monto Dongling. La du mortis por malsamaj motivoj, sed la damaĝo al ilia vivo kaj la vundo al ilia denaska naturo estis la samaj. Kial do ni devas laŭdi Boyi kaj kondamni la rabiston Zhi? Ĉiu en la mondo sin oferas por io. Tiuj, kiuj sin oferas por la humaneco kaj la justeco, estas nomataj “nobluloj”, dum tiuj, kiuj sin oferas por riĉaĵoj, estas nomataj “vulgaruloj”. La sinoferoj estas la samaj, kaj tamen ni havas “noblulojn” kaj “vulgarulojn”! Koncerne la damaĝon al la vivo kaj la vundon al la denaska naturo, la rabisto Zhi faris ĝuste la samon, kiel Bo Yi. Kial do ni devas fari la distingon pri “noblulo” kaj “vulgarulo”?

Cetere, tiuj, kiuj adaptas sian denaskan naturon al la humaneco kaj la justeco, eĉ se ili faras tion tiel bone kiel Zeng Can kaj Shi Qiu, ne estas laŭ mi homoj “ eminentaj”. Tiuj, kiuj adaptas sian denaskan naturon al la kvin gustoj, eĉ se ili faras tion tiel bone kiel Yu Er, ne estas laŭ mi homoj “perfektaj”. Tiuj, kiuj adaptas sian denaskan naturon al la kvin tonoj, eĉ se ili faras tion tiel bone kiel Shi Kuang, ne estas laŭ mi homoj havantaj akran aŭdadon. Tiuj, kiuj adaptas sian denaskan naturon al la kvin koloroj, eĉ se ili faras tion tiel bone kiel Li Zhu, ne estas laŭ mi homoj havantaj akran vidadon. La de mi nomata “ eminenteco” kuŝas ne en la humaneco, nek en la justeco, sed en la konservado de propraj personaj kvalitoj. La de

mi nomata “perfekteco” kuŝas ne en la humaneco, nek en la justeco, sed en la akcepto de la esenco de la denaska naturo kaj la destino. La de mi nomata “akra aŭdado” aludas ne la aŭdon de io alia, sed la aŭdon de si mem. La de mi nomata “akra vidado” aludas ne la vidon de io alia, sed la vidon de si mem. Se iu vidas ne sin mem, sed nur aliajn, se iu kontentas ne pri tio, kion li posedas, sed pri tio, kio apartenas al aliaj, li povas nur envii, kion aliaj havas, sed ne povas ĝui, kion li mem havas, kaj li povas kontentigi nur aliajn, sed ne sin mem. En tiu ĉi senco la rabisto Zhi kaj Bo Yi iras egale tro malproksimen sur sia vojo de perverseco. Mi hontas antaŭ la Taŭo kaj la virto, kaj tial mi kuraĝas nek persisti en la praktikado de la humaneco kaj la justeco, nek sekvi la agojn de ekscesa perverseco.

Elĉinigis



Wang Chongfang

(Ĉinujo)

Ĉineske

Vejdo (Ĉinujo)



Verda persistanto

omaĝe al 60-jariĝo de esperantisteco de

Miĉino (Guozhu)

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Multegas

ĉinoj en la mond’

sed Miĉino ’stas nura,

li aktivis en E-rond’

kun granda volont’.

Tempdaŭro

de sesdek jaroj

prezentas liajn spurojn
de abelecaj faroj —
beletraj varoj.

Miĉino —
verkanto lerta —
skribas esperante kaj
ĉine kun fido certa
per mano sperta.

Poemojn
kaj prozojn vere
li ja verkis abunde
kun flua tekst' leĝere
stila libere.

Miĉino —
la pioniro
de ĉinesko — kultivas,
akvumas kun aspiro
idojn en milo.

Sub lia
zorgo amema
kreskas ĉinesk' prospere
en ĝardeno poema —
trezoro gema.

Miĉino —
bona orator' —
propagandas kaj pledas
nian lingvon kun fervor'
sen ajna langvor'.

Ĉie ajn
ŝancon kaptas li
por disvastigi l' lingvon
konvinki kun emoci'
kaj granda pasi'.

Aĥ, amik'
kaj kara mentor',
li meritas respekton
kaj saluton de ador'

pro sia labor'!



Ŝarĝo de du azenoj

el rakontoj pri Afanti
—laŭ ĉinesko Sopor-al-sudo*

La reĝo
kaj kortegano
kun Afanti en arbar'
ĉasis en akompano
sub sunlum-bano.

Ĉar estis
varmege, la du
moŝtoj do malvestis sin
kaj donis vestojn kun ĝu'
jen al li sen bru'.

Afanti
surŝultre portis
ilin kaj daŭre iris.
la ŝarĝ' lin malkomfortis
kaj ŝvite tordis.

Vidinte
kun moka mien'
tion, la reĝo ŝerce
diris: "Afanti, per pen'
vi kiel azen'

la ŝarĝon
vi portas stulte.
Ĉu vi ne estas saĝa
kaj kapablas tre multe
kaj senkonsulte?"

Afanti

flamis en koler’
 kaj replikis trankvile:
 “Vi diris ja kun tener’
 prave kun sincer’.

Mi portas
 la ŝarĝon vere
 sur miaj ŝultroj pezan
 de du azenoj mizere,
 tedaj infere!”



Licius (Ĉinujo)



**Saluton al la 60a jariĝo de
 samideano Guozhu kiel
 esperantisto**

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*
 Miĉino:
 Esperanta kor’!
 movade ciklas vigla;
 mire soras kun fervor’
 al ĉineska flor’.

(Pekino, 2016/12/12)

*Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksfirma
 poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo
 xa,xa,a (x=senrima).

Lily (Ĉinujo)

Kaŝa amo

—laŭ ĉinesko Dekses-Silabo*
 Am’
 kaŝa brulas kiel flam’

ardanta
 disvolviĝa jam.

Al
 li mi ofte kun amar’
 sopiras
 sen ajna deklar’.

Mi
 eĉ imagas kun pasi’
 ke amas
 min li kun mani’.

Sed
 je mia pensa obsed’
 ignoras
 min li sen ridet’.

En
 mia kor’ naskiĝas ĝen’
 turmenta
 kaj trista ĉagren’.

Li,
 kvazaŭ venus kun magi’,
 songiĝas
 min pri amebri’.

Per
 man’ li kun dolĉa tener’
 karesus
 min en basa kver’.

Min
 kovrus per kisoj sen fin’
 li ĝoje
 je mia fascin’.

Lang’
 lia lekus min sur vang’
 volupte
 per lia brak-tang’.

Sur
mi li knedus en plezur'
la mamojn
en ĝema murmur'.

Je
eroto impulsa tre
li tordus
ĝis seks-apoge'.

Jam
mi sub lia kaco-ram'
moliĝus
sur plata tatam'.

Aĥ,
kiel sub lia atak'
kvietus
mi en am-bivak'!

**Deskses-Silabo: ĉina fikforma poemo el kvar versoj
de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa (x=senrima)*

Klavdija Grebenŝĉik

Siana ekzotiko

– Mi volas komuniki al vi, – Dima diris al sia najbarino Katja, kun kiu li havis fida-amikajn rilatojn, – ke mi persvadis sian edzinon Zina akiri katon.

– Ĉu vi havas malmultajn klopodojn? – ironie ridetante demandis Katja, kiu suferis pro ĉiaj animaloj, kiujn senfine alportis ŝiaj infanoj.

– Komprenu, filo Feliks tedis al mi: “Mi enuas, mi volas hundon aŭ katon kiel ĉe Mikaelo!” Tio estas kiel ĉe vi.

– Nu akiru katon por sia malfeliĉo! Via Feliks dum semajno ludos kun ĝi, sed sablon alportos kaj ŝanĝos Zina aŭ vi, se ekvolos apartiĝi de viaj desegnaĵoj.

– Komprenu, mi volas ne ordinaran katon...

– Kia? Ĉu la persa?

– Ne, mi volas pli bonan, la siaman! Siamaj katoj ne bezonas sablon, ili mem povas malfermi pordojn por eliri eksteren kiam ekvolos. Oni parolas, ke ili estas pli saĝaj ol hundoj.

– Oni ankaŭ parolas, ke ili havas malbonan karakteron! Ĉu vi scias pri tio? Mia kolemino havas tian katon, tial en ŝia hejmo ĉiuj singlarde iras, ne diras “For!” al la kato, ne interinsultas, ja la besto tuj atakas, ordigas. Ĝi subigis ĉiujn!

– Ĉe mia Zina kato estos kvieta!

–Nu, nu! – Katja diris.

Post kelkaj tagoj Katja revenis post laboro kaj ekvidis en korto knabon Feliks, la kvinjaran filon de Dima. Li sidis sur benko kaj alpremis al si katidon. Li ĉirkaŭprenis ĝin per ambaŭ manoj tiel, ke elstaris nur oreletoj kaj vosteto de la katido.

– Onklino Katja, rigardu, kia ĝi estas bela!

Feliks malpremis manojn, la katido tuj saltis kaj trafis al alia fino de longa benko. Katja kliniĝis super ĝi. La katido estis neordinara. Ĝi tute estis hele bruna, nur vizaĝeto, oreletoj, vosteto kaj pintoj de kruroj estis brunaj, sed okuloj estis hele ĉielbluaj. “Se oni kudris kostumon en tia kolora gamo kaj farus ĉielbluan akcenton, do tio estus tre bele, mode,” – Katja pensis kaj etendis sian manon por karesi tiun belulon, sed tuj malantaŭeniĝis: la katido turnis al ŝi sian akutan vizaĝeton, kaj ĝiaj ĉielbluaj okuloj pleniĝis per sango...

– Oj, onklino Katja, ne tuŝu ĝin, ĝi povas grati kaj eĉ mordi!

– Ĉu vi ne timas?

– Ne, ĝi ne ofendos min, ĉar ĝi amas min, kaj mi amas ĝin!

– Ĉu panjon kaj paĉjon ĝi ankaŭ amas?

– Ne... Panjo kriis al ĝi, ĉar ĝi saltis sur tablon kaj eniĝis en teleron kun hepataĵo. Ĝi malŝatas, kiam oni kriis al ĝi.

“Problemoj komenciĝis ... Mi baldaŭ

vizitos ilin por rigardi, kio ĉe ili okazas,” – Katja decidis. Sed Zina mem vizitis ŝin, pli ĝuste enkuregis al Katja, kiam ŝi malfermis pordon. Vizaĝo de Zina estis kovrita per ruĝaj makuloj, okuloj estis rondaj pro teruro.

– Kio okazis? Vi ne similas mem vin!

– Certe! Rigardu miajn gambojn kaj brakojn! – kaj ŝi levis manikojn de bluzo kaj jupon. Katja hokriis, gamboj kaj brakoj de Zina estis kovrita per sangaj grataĵoj.

– Ĉu tio estas afero de katido?

– Ne, ĝi estas ne katido... Ĝi estas malbonkora sorĉistino, diabla Julieta!

– Do ĝi estas katino. Kia estas ŝia aĝo?

– Kvar monatoj... Mia Dima ankaŭ suferas. Li kutime staras fleksiĝinte super tablo, kaj ŝi uzas lin kiel saltotabulon por salti al kornico. Lia dorso estas kovrita per grataĵoj. Diru, kion mi devas fari? Mi timas iri laŭ propra loĝejo! Ŝi insidas min ĉie – ŝi atakas min el post tablo, el post lito, elkuregas el post divano... Kiam mi venas post laboro, ŝi jam atendas min. Ŝi sidas senmove kiel mumio kaj rigardas min per siaj sangaj okuloj... Mi ne scias, kion ŝi faros: aŭ indiferece preteriros, aŭ ion fiagos...

– Ja mi antaŭsciigis vian Dima, ke siamaj katoj estas sovaĝaj. Fordonu ŝin al iu!

– Aha, mi ne povas. Se mi parolas pri tio, komenciĝas ploro de Feliks. Ili estas nedisigeblaj. Ili kune dormas kaj manĝas. Aŭskultu, Katja, – tono de voĉo de Zina subite ŝanĝiĝis, en ĝi aperis admiro, elpremis antaŭan teruron, – tiu katino ne nur komprenas, ke ni pri ŝi parolas, kaj ankaŭ, al mi ŝajnas, legas miajn pensojn...

– Nu, – Katja malkonfideme diris. – Pro timo ĉia absurdo eniĝas en vian kapon!

– Ne, mi ekzamenis kelkfoje. Mi jam ne krias al ŝi, pro tio estos pli malbone. Mi komencis insulti ŝin senvoĉe kaj eĉ malbeni, ekzemple: “Mi volas, ke vi malaperu, ke diablo forprenu vin!” Kaj kiam mi tiel pensas, ŝi tuj siblas kaj montras dentojn kiel tigro.

– Ne nervumas tiel, mi vidas, ke al vi

ŝajnas ĉia absurdo. Mi vizitos vin, mi volas ekvidi, kio okazas ĉe vi!

Kiam Katja liberiĝis de hejmaj klopodoj kaj venis al la najbaroj, do ŝi ekvidis strangan bildon: sur forno sidis la katino kaj atenteme observis bolantan supon en kaserolo. Kiam peco de viando aperis sur supraĵo, la katino rapide etendis kruron kun ellasitaj ungoj. Zina staris je sendanĝera distanco. Ŝi vokis Katjan.

– Iru ĉi tien, ekvidos, kion nun okazos.

– Julieta en vica fojo etendis kruron kaj lerte kaptis per ungo peceton de viando. Ĵetinte ĝin sur plankon ŝi desaltis sekve kaj komencis peli ĝin laŭ planko kiel kaptitan muson, ĝis kiam viando malvarmiĝis. Tiam ŝi kaptis ĝin kaj forportis.

– Nu, ĉu vi vidis?! – Zina turnis sin al Katja.

– Nekredeble! Kiel ŝi ne timas brogvundiĝi?

– Ja mi parolis, ŝi estas malbonkora sorĉistino! Ĝenerale ŝiaj ungoj estas longaj kaj fortaj. Ŝi iel ne brogvundiĝis.

– Vi ne devas permesi al ŝi eniĝi per kruroj al kaserolo!

– Ŝi ankaŭ eniĝis al teleroj. Kiam ni sidas tagmanĝi, ŝi saltas sur tablon kaj kuras al telero. Kaj ŝi same tiris per kruro ĉion, kio plaĉas al ŝi.

– Mi ne povus elteni tian arogantecon, – Katja diris kaj faris abomenan mienon. – Mi en dua tago elĵetus ŝin tra fenestro.

Malantaŭe aŭdiĝis siblo. Katja reregardis. La katino sidis sur divano, ŝia hararo leviĝis, levita vosto transformiĝis en skovelo, kaj en okuloj pulsas jen ĉielblua jen ruĝa koloro. Dima ŝirmis per si Katjan kaj komencis malrapide forpuŝi ŝin el ĉambro.

– Jen kiel okazas, – Katja timige diris. – Mi foriras! – kaj ŝi retiriĝis al koridoro.

Kiam ŝi elsaltis post pordon, ŝi diris:

– Mi lasas vin kun via serpento! Dum ŝi loĝas ĉi tie, mi ne venos al vi! – kaj ne aŭskultante pardonpetojn de Dima ŝi elkuris el

enirejo.

Vivo en hejmo de Dima kaj Zina transformiĝis en vera infero. Zina venkinte timon pro tiu besto anoncis al ŝi militon. Ŝi malpermesis al Julieta eniri en dormejon post tio, kiam ŝi ĉifinte akurate ordigitan liton ŝiris kusenon kaj ellasis plumojn eksteren. Flugantaj plumoj admiris ŝin, ŝi alte saltante pelis ilin laŭ loĝejo. Per tio ŝi ravis knabon Feliks, kiu pro rido ruliĝis laŭ planko. Veninte post laboro kaj ekvidinte malordigitan liton, flugantaj plumoj kaj filon, kiu de kapo ĝis piedoj estis kovrita per plumoj, Zina forgesinte pri danĝero faris militeman krion kaj kuraĝe atakis la katinon. Ŝi ĵetis al la katino ĉiujn, kiuj estis apude: ŝuo, pilko, pantofloj de Feliks. Ŝi eĉ kaptis tabureton por ĵeti ĝin al la fibesto. Sed tuj Feliks ekstaris kun etenditaj brakoj inter furioza panjo kaj la katino, kaj Zina mallevis tabureton al planko. Unue dum tuta tempo la katino konsterniĝis kaj kureginte sub liton ne aperis dum du horoj. Dum kelkaj tagoj en hejmo estis mallaŭte. La katino estis kviete, ĝentila kaj eĉ iufoje ronronis. Ŝi ne venis en dormejon haltinte en sojlo, longe rigardis al flanko de lito.

– Jen rigardu, – kontenta Zino parolis al sia edzo, – ni ne devas timi ŝin, unufoje mi punis ŝin kaj tuj malkutimigis fiagi.

– Ial al mi ne plaĉas tiu kvieto, – Dima diris.

Sed Julieta kaj poste kondukis trankvile.

Tiu tago ne profetis malagrablecojn. Estis male, venis la oka de marto, la mirinda festo, kiam ĉiuj virinoj havas bonegan humoron, ili estas feliĉaj atendante florojn kaj donacojn. Frumatene, dum Zina dormis, Dima kuris al angulo de domo, kie ĉiam en festoj staris kaŭkazanoj kaj moldavoj kun sia hela kaj aroma varo. Elektinte bukedon de grandaj vinruĝaj rozoj Dima revenis hejmen, aranĝis la florojn en vazon kaj starigis ilin sur ŝranketon apud lito. Li sukcesis ĝustatempe, kaj kiam Zina vekigis, ŝi tuj ekvidis la

belegajn rozojn. Dima staris apud pordo de dormejo, estis fieraj kaj kontenta pro si. Humoro de ĉiuj estis bona, aparte humoro de Zina, ja ŝi ne devis kuiri, ĉar en vespero ili vizitos amikojn.

Kiam en naŭa horo ili revenis post vizito, Zina kuŝigis filon dormi kaj informis, ke ŝi laciĝis kaj ankaŭ kuŝos pli frue. Dima dirinte, ke li devas urĝe prepari laboron por mendisto, komencis ordigi pretigitajn desegnaĵojn. Li estis inĝeniero kaj kromlaboris per tio, ke faris por korespondkursaj studentoj kursajn kaj diplomajn laborojn. Dum longaj vesperoj li faris kalkulojn por maldiligentaj studentoj, kaj grandaj folioj de papero kovriĝis per punktoj de linioj, kiujn lasis post si akriĝinta krajono. Sed nun li enuis. Sur angulo de tablo sidis Julieta kaj observis per dormemaj okuloj movojn de krajono aŭ tuĉsrtekilo. Komence la katino provis kapti glitantan laŭ papero krajonon. Sed Dima kviete, sen histerioj de Zina, klarigis al Julieta, ke tion ŝi ne devas fari. Ŝi komprenis lin kaj sidis kviete.

Zina eliris el banejo, rikaneme deziris al Dima trankvilan laboron (ŝi konsideris katinajn neatenditajn artifikaĵojn) kaj malaperis en dormejo. Post minuto de tie aŭdiĝis tia krio, ke Dima ekstremis kaj faligis tuĉsrtekilon. Julieta saltis supren, ŝiris per ungoj paperon, renversis tuĉon kaj malaperis. El dormejo elsaltis timigita Zina kaj balbutante petis:

– Rig-gardu, kion estas tie ĉe mi...

Dima ĵetis sin al ploranta Zina.

– Kie?

– Tie malantaŭe, – ŝi turnis sin al li per dorso.

Dum sekundo estis mallaŭte, poste Zina ekaŭdis mallaŭtan ridon. Dima rigardis rozon, kiu pendis kapinverse sur nokta ĉemizo de Zina.

– Nu kion ridindan vi trovis tie? Forigu tion, ja tio pikis min!

– Tuj mi forigos, staru trankvile! – spasme spirante pro rido Dima petis kaj komencis

dum ĝemoj de Zina atenteme elpinĉi dorsojn el ŝia dorso.

– Jen tio estis sur via dorso!

– Ĉu rozo?! Sed kiel ĝi trafis al mia lito?

– Mi mem ne komprenas, – Dima diris pririgardante ĉambron per atenta rigardo.

– Ĉu vi serĉas Julietan? Ĉu vi pensas, ke la katino povis fari tion?

– Ordinara katino ne povus, sed la siama... Ja siamaj katoj estas tre saĝaj kaj venĝemaj. Vi anoncis kontraŭ ŝi militon, ŝi anoncis militon kontraŭ vi.

– Sed tio estas plena prudenta ago, tion povas fari nur homo.

– Oni instruis nin en lernejo, ke animaloj havas nur instinktojn. Sed iufoje ili tre bone pensas...

Zina sidis kun mallevitajn ŝultrojn kaj embarasite rigardis al Dima.

– Mi timas ŝin. Se vi ne forigos ŝin, do mi foriros al panjo.

Julieta kvazaŭ komprenis, ke tro fiagis kaj iĝis kvietaj. Ŝi jam ne ĵetis sin al Zina el embusko, ne arogis apud tagmanĝa tablo. En hejmo malaperis krioj, grataĵoj de Zina cikatriĝis. Zina kaj Dima mallaŭte ĝojis kaj nun rigardis tiun siaman miraklon per pli bonkoraj okuloj. Sed trankvilo kaj kvieto baldaŭ finiĝis. En unu tago Julietaj ekkantis. Ŝi saltis sur fenestrobreton, rigardis tra fenestro kaj hurlis. Ŝia voĉo estis kun ruladoj kiel mezosoprano de opera kantistino, poste la voĉo iĝis simila al infana ploro, sed iufoje en ĝi aŭdiĝis tia sopiro, ke malvarmo trakuris dorsojn de Zina kaj Dima. Feliks karesis ŝin laŭ dorseto, persvadis ĉesi plori. Kaj poste ŝi komencis rondkuri laŭ muroj kiel motociklo en fama cirka distraĵo. Same kiel motociklistoj ŝi kuregis kun freneza rapido, post ĉiu nova rondo leviĝis pli alte kaj preskaŭ atingis plafonon. Trankvila vivo tute malaperis. Nokte Julietaj forkuris al korto. Kiel ĉiam ŝi aliris al pordo, saltis supren kaj ekpendis sur ĝia anso. La pordo malfermiĝis, kaj Julietaj

malaperis ĝis mateno. Hurlo kaj ploro jam aŭdiĝis el post fenestro. Al ili aliĝis voĉoj de virkatoj, kiuj alkuris el apudaj kortoj pro pasiaj alvokoj de Julietaj. Pri dormo oni povis nur revii.

Dima kuris konsiliĝi kun Katja pri tio, kion li devas fari kun la katino.

– Ŝi freneziĝis, mi devas konduki ŝin al veterinaro, verŝajne li faros por ŝi trankviligan injekton. Kiel vi opinias?

– Kia estas ŝia aĝo? – Katja demandis.

– Ses monatoj. Kial vi demandas?

– Ĉu vi ne komprenas? Ja via Julietaj ne trankviliĝos, ĝis kiam ŝi renkontos sian Romeo.

– Nu! Ankoraŭ frue...

– Verŝajne via katino rapide elkreskis.

Sed baldaŭ la katino ĉesis hurli, forkuris nokte kaj iĝis kvietaj kaj karesema. Ŝi iris al ĉiuj, frotiĝis per flanko kaj ronronis.

Ree en hejmo aperis kvieto kaj trankvilo, sed tio daŭris ne longe. Foje Zina rimarkis, ke ventro de la katino estis ronda.

– Aŭskultu, nia katino baldaŭ disduiĝos, aŭ distriiĝos, aŭ eĉ dissesiĝos!

– Ni devis atendi tion! – Dima ekkriis.

– Nun mi kontrolas.

Zina komencis karesi la katinon malrapide mallevinte manojn al ŝia ventro.

– Mi estis prava! Mi palpas kapetojn. Unu, du, tri... – Zina komencis kalkuli. – Tie estas ankoraŭ, sed ili interne. Baldaŭ ŝi naskos!

– Jen vi kiel flegistino akuŝigos! – Dima ekridis. En lia voĉo klare estis historiaj notoj.

– Ne! Dima, imagu, ke laŭ loĝejo kuregas amaso de tiaj diabletoj kiel ilia freneza panjo!

– Kion vi proponas?

– Mi anoncas al vi ultimaton: ĉi tie estos aŭ mi, aŭ Julietaj kun siaj idoj!

En sekva tago en bazaro por vendo de bestoj apud vendistoj de miaŭanta, bojanta kaj pepanta viva varo staris Dima kun tornistro, el kiu elstaris bruna kapo de la katino kun belegaj ĉielbluaj okuloj. Multaj homoj haltis

por rigardi neordinaran katinon. Sed kiam aliris junulo kaj demandis pri prezo, el post dorso de Dima elsaltis Feliks kaj diris:

– Onklo, ne aĉetu, la katino estas tre malbonkora, – kaj la knabo desaltis al flanko.

Dima minacis lin per pugno. La aĉetanto levis ŝultrojn kaj foriris.

– Oj, kia estas bela katino! Kiom ŝi kostas? – virino demandis.

– Onklino, ne aĉetu ŝin, ŝi mordas kaj gratas! – Feliks ree enmiksiĝis.

– Ĉu efektive? Estas bone, ke vi antaŭsciigis min, knabo!

– Vi komence interkonsentu kun la knabo, kaj poste vendu, – edife konsilis viro, kiu tenis je mano kaĝon kun kobajoj.

– Feliks, finu, ja vi scias, ke panjo ne enlasos nin, se ni revenos kun Julieta. Mi estas pretita fordoni ŝin senpage por liberiĝi!

Kaj tiel okazis. Alirinta viro estis amanto de tiu raso kaj, malgraŭ antaŭsciigoj de Feliks, kiuj aŭdiĝis el post dorso de la patro, kun plezuro prenis ŝin kiel donacon kun estontaj idoj kaj tornistro.



Ilustraĵo de Igorj Ĥomjakov

Feliks ekporetis, malfeliĉe ekspiris, karesis je disiĝo la katon kaj iris al pordego, kiu kondukas el bazaro. La patro iris apude kaj provis trankviligi.

Pasis semajno de mallaŭta, kvietita vivo. Feliks vagis laŭ ĉambroj, estis indiferenta al

ĉio, eĉ al mirinda fervojo, kie veturis tri vagono kaj lokomotivo. Dima fleksiĝinte super desegnaĵoj rigardis angulon de tablo, kie antaŭe ĉiam sidis Julieta, al kiu li en nokta senbruo rakontis pri siaj problemoj. Zina enirante al kuirejo aŭ al ĉambro rerigardis malantaŭen atendante, ke tuj elsaltos la katino kaj ekpendos sur ŝia negliĝa mantelo aŭ ungratos ŝian gambon. Estis sopire kaj enue. Ĉiu pensis: “Kiel nun ŝi vivas?” Zina komencis ofte inviti aliajn infanojn, por ke ili distru la filon de pensoj pri Julieta.

Foje vespere ili ekaŭdis, ke iu tiras pordan anson.

– Feliks, malfermu, verŝajne al vi Maria venis, ŝi ne atingas sonorilon.

Feliks malfermis pordon, kaj el koridoro aŭdiĝis lia ĝoja krio:

– Ŝi revenis, revenis!

Alkurintaj Zina kaj Dima konsterniĝis pro subiteco: en sojlo sidis Julieta. Ŝia aspekto estis povra, flankoj kaj kruretoj estis malpuraj, kaj okuloj fermiĝis pro laco.

– Tio estas sorto! – Dima diris kun ia faciligo, kaj en lia voĉo estis ĝojo.

– Tamen mi devos akuŝigi! – Zina ridetis.

– Kaj ni havos multajn tiajn katidojn! – feliĉa Feliks gaje sumigis.

Esperantigis



Igorj Ĥomjakov

(Rusujo)



Eldonas Redakcio de *Penseo*

Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Veĵdo)

Adreso: No.-3-2 de la 5-a etaĝdomo de No. 19, St. Wujiang, Jiangbei-Distrikto, Chongqing, 400023, Ĉinio

Tel: (023) 67095890 (hejme)

Retadreso: vejdo@163.com

Ĉiujn kontribuojn al la ĉefredaktoro.

Por legi pasintajn numerojn de *Penseo*, vin turnu al www.elperno.cn/penlisto.htm

